

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Rés. Terrasse Rue du 11 nov. 59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT L' Oazo B. P. 54 49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59000 LILLE
Peranto I.K.U.E.: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE
C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN

==== la m^o: 6 F. Abono: 23 F (TTC). Kotizo: 7 F. Sume: 30 F. ====

XX

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent mepre
antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

XX

==== N^o 155 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== DECEMBRO 1987 ====

XX

BILETO DE LA PREZIDANTO

En cette année, les espérantistes du monde entier célèbrent, avec le fondateur de la Langue Internationale, le centenaire de la première publication de ses éléments. Ainsi, le Docteur Zamenhof, en offrant au monde ce moyen de communication universel, voulait que ce fût un moyen d' écoute, de compréhension de rapprochement entre tous les membres de la famille humaine. Son message, qui fut entendu dès les premiers temps, rencontra l' hostilité des autorités de l' empire des tsars, de même que, plus tard, l' interdiction et la persécution des gouvernements totalitaires. Mais son extension à travers le monde s' est poursuivie, malgré les guerres et les indifférences. Cependant, on peut s' étonner de la lenteur de son recrutement, et surtout du peu d' intérêt que rencontrent ses potentialités auprès des instances qui, cependant, reconnaissent que le besoin de pratiquer quotidiennement des relations entre diverses nationalités, serait grandement facilité par l' usage d' une langue commune. Il existe actuellement, dans le monde entier, des espérantistes isolés ou groupés, qui écrivent et parlent, publient des périodiques, écrivent et traduisent des œuvres littéraires, se retrouvent sur le plan de leurs vocations communes, scientifiques, artistiques, ou simplement touristiques. Mais ils constituent des minorités, négligées par les grands moyens de communication, dérangeantes pour les habitudes, regardées de loin par la foule des sceptiques.

Il en est de même dans les Eglises. En ce temps où tout évolue vers des relations de plus en plus étroites de peuple à peuple, où les mouvements d' idées ignorent les frontières géographiques, la barrière des langues demeure un obstacle à la progression vers l' unité des enfants de Dieu. L' un des buts du mouvement né de l' initiative d' Emile Peltier, encouragé par son évêque, c' est de mettre au service de l' Eglise ce moyen de rapprochement, et d' étendre sur le monde, parallèlement au développement des sciences et des civilisations, un réseau fraternel imprégné de la spiritualité de l' Evangile et de la dimension chrétienne de l' homme.

.../...

Nous sommes donc solidaires du mouvement espérantiste général. Nous devons participer à son extension, en soutenir les manifestations de toutes sortes. Nous ne pouvons nous désintéresser de ses activités à caractère neutre, et surtout de celles qui ont une relation directe avec les centres d'intérêt qui nous touchent de près. Tout ce qui concourt à sa progression doit nous mobiliser dans toute la mesure de nos moyens. Mais il importe aussi que nous agissions avec notre personnalité, toute notre personnalité de chrétiens, dans le respect et la tolérance des autres, mais sans vouloir masquer nos propres convictions.

L'Union Internationale Catholique Espérantiste (I.K.U.E.) qui a des représentants dans plus de trente pays (22 langues différentes) existe depuis 82 ans. En France, où elle est née, notre association en demeure un membre vivant. Chacun de ses adhérents doit avoir la volonté de participer au développement de la famille espérantiste, mais aussi d'y témoigner de la présence chrétienne, et de travailler à mettre au service de l'Eglise ce moyen efficace de progresser vers l'unité et la paix.

R. Cl. COLAS

RESUMO

En la centjara datreveno de la unuaj paŝoj de Esperanto, la tuta esperantistaro dediĉas omaĝojn al la memoro de Doktoro Zamenhof. La mesaĝo, ek de la komenco, renkontis kontraŭagojn kaj barojn, tamen trafis homojn de ĉiuj partoj de la mondo, spite de la militoj kaj de la disputoj aŭ kontraŭstaroj.

Multaj instancoj deziras havi komunan lingvon por la internaciaj rilatoj, sed ŝancelas por fari la unuan paŝon aŭ cedas al la miskompreno de la plimulto.

En la tuta mondo, izoluloj kaj grupoj esperantaj skribas kaj parolas, eldonas revuojn, verkas librojn, tradukas literaturajojn. Ekzistas ĉiujare renkontoj sur la terenoj de saminteresej, samopiniaj, sciencaj, artaj, metiaj aŭ simple turismaj. Sed niaj sociaj medioj, informrimedoj, gazetoj, ignoras tion aŭ rigardas ĝin skeptike aŭ dubeme.

Estas same en la Eklezioj. En ĉi tiu tempo, ĉio evoluas al pli kaj pli da rilatoj internaciaj, ĉu inter altaj instancoj, ĉu en la popolaj medioj. La inspiro de Emile Peltier (ekde 1905) celis proponi la uzadon de la mondlingvo por la disvolviĝo de la evangelia spirito.

Ni ŝuldas nian solidarecon al la tuta esperanta movado, precipe en la rilatoj al niaj propraj intereso, sed ni devas ankaŭ agi kun nia tuta personeco de kristanoj. Tio estas la senco de nia aliĝo al I.K.U.E., kiu, de 82 jaroj, celas labori por la atesto de la kristana estado, kaj por la progreso de la unueco en Kristo kaj de la Paco.

R. C. C.

oo

KIEL INFANO

Venu, o Jesuo, en la vindotuko,
Ne meze de la armiloj;
En la humileco, ne en la luksaĵoj;
En la kripo, ne en la ĉielaj nuboj;
En la brakoj de via patrino,
Ne sur la trono de via majesto;
Sur la azenino kaj ne sur la keruboj;
Al ni, ne kontraŭ ni;
Por ŝavi, ne por juĝi;
Por viziti nin pace,
Ne por kondamni nin furioze.

Se vi tiele venos, o Jesuo,
Antaŭ ol fuĝi, ni fuĝos al vi.

Pierre de Celle (XII-a jarcento)

oo

NIA MEMBRARO

Novaj anoj: 9) S-ro SAMAIN (Dise); 10) S-ro PETIT (Nord); 11) S-ino GABRIELLI (Paris)

Fratan bonvenon al ili!

* * * * *

PREGO DE L' PAPO POR LA MARIA JARO

1. Patrino de l' Savanto,
en tiu jaro al vi dediĉita,
Ĝojplenaj, ni proklamas vin beata.
Dio la Patro vin elektis
jam antaŭ la kreado de l' mondo
por efektiviĝi la savplanon antaŭviditan de sia Providenco.
Vi kredis je la amo, vi obeis lian vorton.
La Filo de Dio volis vin kiel Patrino,
kiam li iĝis homo por savi la homon.
Vi lin akceptis kun fevora obeo kaj nedividita koro.
La Sankta Spirito vin amis
kiel mistikan edzinon,
li superŝutis vin per unikaj donacoj.
Kaj vi, vi lasis vin modli,
obeante lian misteran kaj potencon agadon.
2. Ĉe la sojlo de la tria jarmilo de l' Kristanismo,
ni konfidas al vi la Eklezion,
kiu vin agnoskas kaj alvokas kiel Patrino.
Vi, kiu sur tero ĝin antaŭiris en ĝia kredo-pilgrimo,
fortigu ĝin en la malfacilaĵoj kaj afliktaĵoj,
kaj faru, ke en la mondo,
ĝi estu ĉiam pli efike la signo kaj ilo
de la intima kuniĝo kun Dio
kaj de l' unueco de la tuta homaro.
3. Al vi, Patrino de la kristanoj,
ni konfidas laŭ spiciala maniero
la popolojn, kiuj solenas, dum tiu Maria jaro,
la sesan jarcenton aŭ la jarmilon
de sia aliĝo al la Evangelio.
Ilia longa historio estas profunde stampita
per ilia pieco kontraŭ vi.
Turnu al ili vian amoplenan rigardon;
donu forton al tiuj, kiuj suferas pro la kredo.
4. Al vi, Patrino de l' homoj kaj nacioj,
kun plena fido,
ni transdonas la tutan homaron,
kun ĝiaj timoj kaj esperoj.
Zorgu por ke la lumo de la vera saĝeco
ne manku al ĝi.
Gvidu ĝin en la serĉado de l' libereco kaj justico por ĉiuj.
Direktu ĝiajn paŝojn survoje al la paco.
Faru, ke ĉiuj kaj ĉiu trovu Kriston,
lin, la vojo, la vero kaj la vivo.
Subtenu, o Virgino Maria,
nian iradon en la kredo,
kaj havigu al ni la gracon de l' eterna savo.
O favora, o pardonema,
o milda Dipatrino kaj nia Patrino, o Maria!

Johano-Paŭlo II-a

RENOVIGO DE 1/3 DE LA KOMITATO

Finos sian mandaton en 1988:

S-roj A. Bessière, L. Bourdon, R. Cl. Colas kaj R. Despiney.

Nia sekretariino (v.p. 1) atendas ilian rekandidatiĝon, kaj plezure bonvenigos novajn kandidatojn. Asocio pli bone kaj efike funkcias, kiam freŝa "sango" alportas novan forton al la gvida organo. Ne opinii vin netaŭga; ĉiu ano de FKEA ricevis talentojn, kiujn, kiel kristano, li nepre devas fruktigi. Relegu la parabolon pri la talentoj!... kaj estu bonaj "servantoj" de via asocio.

KRISTNASKA VESPERO

Mi bruligas kandelojn sur verda abi,
ornamas per arĝentemaj bendetoj flu,
kaj alvokas iun foran: "Venu al mi
ĝojon dividi, ke mi ne timu plu
tiuajn ĉi nigrajn ombrojn en ĉiu angulo
kaj embuskan silenton ĉie ekstere."
Min minacas timo, malica fortulo,
ĝi volas perfide min kapti senpere.

Mi aldonas kandelojn en preĝo pia
kaj imagas iun, kiu ie iras;
lin, kiu estas vera, ne iluzia,
kiu delonge min renkonti deziras.

Ĉe pordo aŭdeblas tintado sonore, -
li venas kun neĝeroj sur pelta felo,
salutante kisas mian vangon kome
kaj diras: "Sciuj, estas daŭra la celo
nur resti kun vi, mia milda trezoro.
Mi longe vin serĉis, tamen trovis fine.
Pereos viaj zorgoj kaj la angoro,
kaj feliĉo en hejmon venos difine."

Ni sidas apude en sankta vespero,
kandeloj fascinās per flamo tremanta,
ekregis la paco kaj beno sur Tero...

Aŭ tra fenestro sonis nur flustro venta?

Antonina APOLLO (16/12/1986)

+++++

LA PEZO DE NENIO

- Diru al mi, kiom pezas neĝero? demandas la paruo al la kolombo.

- Nenion alian krom nenio, estis la respondo.

Tiam, la paruo rakontis la jenon al la kolombo:

"Mi staris sur abia branĉo, kiam eknēgis. Tute ne estis ŝtormo, nur kvazaŭ nevo, malrapide, kviete...

Ĉar mi havis nenion alian por fari, mi éknombriis la neĝerojn, kiuj falis sur la branĉon, kie mi tenis min... Ĝa ili falis 3 751 952!

Kiam la 3 751 953-a falis sur la branĉon - nenion alian krom nenio, kiel vi diris - ĉi tiu rompiĝis".

Tion dirinte, la paruo forflugis. La kolombo, aŭtoritatulo pri Paco de post la epoko de iu Noo, pripensis momenton, kaj fine diris:

"Eble, mankas nur unu homo, por ke ĉio renversiĝu, kaj ke la mondo vivu en Paco."

Trad. G. PREUX

+++++

^INFORMOJ

- 1) Ĵus aperis "Sanktuloj de la romia kalendaro", tradukita kaj kompilita de nia fidela nederlanda membro S-ro Brans. Prezo: 45 F. Havebla pere de S-ino J. Vincent.
- 2) Kataluna E^o-Asocio kaj la konservantaro de la internaciaj floraj ludoj invitas ĉiulingvajn geverkistojn konkursi per siaj plej valoraj verkoj en la 28-aj Floraj Ludoj, kiuj okazos kadre de la 24-a Kataluna Kongreso 1988.

LEGENDO PRI KRISTOFORUS

Iam vivis giganto nomita Offerus, impone granda kaj forta; neniu estis tiel forta kaj li paŝis kiel alispeca estulo superante la kapon de la homoj. Tiam kaj teruron li kaŭzis kaj ĉiu evitis lin. Sed lia koro ne estis gaja. Tial li pripensis la eblecon serĉi la plej potencon reĝon por servi lin. Kaj li venis al reĝo, kiun oni taksis la plej potenca en la mondo. Tiu dungis lin kaj Offerus servis lin. Iun tagon muzikisto kantis antaŭ la reĝo. En la kanto estis menciita la nomo de la diablo, kaj ĉar la reĝo estis kristano, li signis frunton kaj krosskoron per la krucsigno. Offerus miregis pri tio kaj li iris al la reĝo por peti klarigon. La reĝo hezitis antaŭ ol respondi, sed Offerus diris: "Se vi me konfesos, mi ĉe vi ne restos!" Tiel li devigis la reĝon, kiu diris: "Se mi aŭdas la nomon de la diablo, mi benas min per la krucsigno, por ke li ne havu potencon super mi." Tiam diris Offerus: "Via timo de la diablo montras al mi, ke li estas pli forta ol vi; adiaŭo, mi serĉu la diablon, por ke li estu mia mastro."

Do li najdante forlasis la reĝon kaj en solejo renkontis rajdantaron. Iu el ili, ruĝe vestita, demandis lin, kien li veturas. Offerus respondis: "Mi serĉas la Sinjoron Diablo kaj volas servi lin." Diris la ruĝa kavaliro: "Estas mi, kiun vi serĉas!" Nun gajiĝis Offerus, ĉar li tiel rapide estis trovinta la diablon; li promesis al li sian servon kaj sekvis lin. Kiam ili estis kume rajdantaj, ili atingis lokon, kie ŝtatis kruco. Tuj la diablo forlasis la vojon kaj rajdis sur kromvojo, por eviti la pason antaŭ la kruco. Offerus miris pri tio kaj demandis la diablon, kial li ne rajdas sur la rekta vojo. La diablo hezitis antaŭ ol respondi, sed Offerus diris: "Se vi ne konfesos, mi ĉe vi ne restos!" Tiel li devigis la diablon, kiu diris: "Vivis homo kun la nomo Kristo, kiu estis krucumita; vidante la krucon mi ĉiufoje ektimas kaj fuĝas, ĉar tiu krucumito ne estas morta." Tiam diris Offerus: "Estas malkaŝe, ke tiu Kristo estas pli forta ol vi; adiaŭo, mi serĉu lin por esti lia servanto."

Longan tempon li demandadis, ĉu iu volas gvidi lin al Kristo; sed li serĉis kaj demandis vane. Fine li venis al ermito, kiu predikis al li la evangelion kaj instruis lin: "Se vi volas servi Kriston, tiam vi devas multe fasti." Offerus respondis: "Tion mi ne ŝatas, ĉar mi estas granda kaj forta kaj pro tio bezonas multan nutraĵon." Diris la ermito: "Necesas ankaŭ, ke vi multe preĝu al via reĝo." Respondis Offerus: "Tion mi ne kapablas kaj tiel mi ne povas sekvi lin." Fine parolis la ermito: "Ĉu vi konas la grandan akvon, kie multaj homoj dronas, se ili transvojaĝas. Vi estas granda kaj forta; transportu la homojn por pago dia, tiel vi plaĉos al via reĝo." Num diris Offerus: "Tion mi certe kapablas, kaj tiel mi volonte servos lin." Do li iris malsupren al la rivero, konstruis kabanon apud la bordo, prenis stangon en la manon kaj portis la homojn transen laŭ ilia deziro.

Post longjara servado tia, kiam li ripozis en la kabano, Offerus aŭdis infanan voĉon vokantan: "Offerus, transportu min!" Li tuj leviĝis kaj kuris antaŭ la kabanon; sed li rimarkis nenium kaj tial li eniris la kabanon kaj kuŝiĝis sur la ripozejon. Ankoraŭ dufoje li aŭdis la vokon kaj eliris por atente rigardi en la malhelon; fine li ekvidis knabeton, kiu lin petis esti portata trans la akvon. Offerus prenis lin sur la ŝultron, kaptis la stangon kaj eniris la riveron; sed ju pli li iris profunden des pli peziĝis la infano, des pli altiĝis la akvo ĉe la kokso, tiel ke li estis en danĝera situacio kaj li timis ekdronon. Kiam li estis portinta la infanon kun granda peno al la bordo, li alparolis lin: "Vi danĝerigis min dum la transporto kaj vi estis tiel peza sur mia ŝultro kvazaŭ mi estus portanta la tutan terglobon." Respondis la infano: "Ne miru pri tio; ĉar vi portis kaj ĉielon kaj teron, kaj eĉ ankaŭ tiun, kiu kreis ilin. Mi estas Kristo, via reĝo. Kliniĝu, por ke mi vin baptu kaj donu al vi novan nomon Kristoforus, tio signifas Kristoportanto. Kaj kiel signo pri la vereco de mia parolado, plantu vian stangon en la teron ĉe la bordo, por ke ĝi verdiĝu kaj portu fruktojn kiel palmarbo." Baptinte la giganton, la infano malaperis. Kristoforus plantis sian stangon en la teron apud la kabano kaj ĝi verdiĝis kaj portis fruktojn.

Post multaj jaroj, Kristoforus venis al la urbo Samos, kie li kuraĝigis multajn kristanojn persekutatajn. Tial li estis kaptita kaj kondukita antaŭ la reĝo Dagnus, kiu demandis lin pri nomo kaj patrujo. Kristoforus respondis: "Antaŭ mia bapto mi nomiĝis Offerus, nun mia nomo estas Kristoforus." Diris la reĝo: "Vi akceptis malsaĝan nomon, ĉar la krucumita Kristo ne povis sin helpi, li ne helpos vin." Kristoforus respondis: "Viaj dioj estas faritaj de homoj; ili havas nek vivon nek potencon. Sed mi fidas je Kristo, la eterna reĝo kaj Sinjoro, ĉar al li estas donita ĉiu potenco en la ĉielo kaj sur la tero." Ĉar li rifuzis oferi,

li estis batita per feraj vergoj kaj enkarcerigita. En la maliberejo li ankaŭ kristanigis multajn soldatojn kaj poste ĝoje suferis turmentan morton.

Prezentita en La ChauX-de-Fonds en oktobro 1987.

XX

FKEA-PILGRIMO AL LOURDES 7/12-an de APRILO 1988

*

Alveno: 7/4 posttagmeze - Forveturo: 12/4 matene.
PERANTO: F-ino PREUX 55/3 Rés. Terrasse Rue du 11 nov. 59290 WASQUEHAL
KOKO: "Soeurs de l' Assomption" 25, route de Pontacq 65100 LOURDES
KOTIZOJ/ unuopulo: 50 F; geedza paro: 80 F; infano ĝis 16-jara, blindulo, kriplulo, sacerdoto, religiul(in)o, alilandano, KELI-ano: senpage.
PAGOJ: Association Catholique Française pour l' Esperanto.
LIMDATO: 20-an de marto 1988.
PREZO: 150 F por unu tranoktado kaj tri manĝoj

*

TEMO: Maria, patrino de la Savanto.

ALIĜILO (limdato 20-an de marto 1988)

sendota al F-ino G. PREUX 55/3 Rés. Terrasse Rue du 11 nov. 59290 WASQUEHAL

*

S-ro, S-ino, F-ino (1)

Adreso:

Naskiĝdato (nur por infanoj):

aliĝas al la pilgrimo laŭ la ĉi supraj kondiĉoj kaj pagas:

aliĝo 50. aŭ 80

restado ... tagoj po 150 F

donaco

Sume

(1) Forstrekuj la senutilaĵojn.

Mi deziras ... fervojajn rabatilojn.

DATO

SUBSKRIBO

